

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 5an de decembro 2013 per Skype.

*Protokoll frå styremøte i Norsk Esperanto-Forbund
torsdag 5. desember 2013 via Skype.*

(Protokolo aprobita retroŝte la 5an de januaro 2014.
Protokoll godkjend pr. e-post 5. januar 2014.)

Partoprenis: / Til stades:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Amelie Matt en Tromsø
Ulf Chr. Lunde en Os
Herman Ranæs en Trondheim, de meze en punkto 5

0. Tagordo

Aprobita. Mankas la sekretario, protokolos Jardar Eggesbø Abrahamsen.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 7an de novembro

Aprobita.

2. Ekonomio / Økonomi

La estraro decidis protokoli tiun punkton ankaŭ norvege.
Styret vedtok at dette punktet skulle protokollførast også på norsk.

La kasisto raportis pri la ekonomio:

Kasseraren rapporterte om økonomien:

Skagen Vekst: 41 666 kr.

Skagen høyrente: 63 977 kr.

Okaze de la laboro starigi altinterezan konton bezonatas decido pri signaturrajto. La estraro decidis doni signaturrajton al kasisto Anne Karin Bondhus kaj prezidanto Jardar Eggesbø Abrahamsen unuope.

I samband med arbeidet med å opprette høgrentekonto trengst det eit vedtak om signaturrett. Styret vedtok å gi signaturrett til kasserar Anne Karin Bondhus og leiar Jardar Eggesbø Abrahamsen kvar for seg.

3. Ĉefdelegito

Estas tempo por nomumi ĉefdelegiton por la periodo 2014–2016. La estraro demandas al Agnar Fitjar, ĉu li pretas daŭrigi en sia posteno.

4. Landa Kongreso 2015

Nin kontaktis hotelo en Lillehammer, kiu ofertas restadon ktp. por 1225–1425 kr tage, inkluzive de tranoktado kaj kunvenejo. Tio estas pli-malpli duoble de la sumoj kiujn niaj membroj kutimas pagi. Do kvankam ni ne tuj neos al la oferto, ni pluserĉos alternativojn.

5. Seminario 2014

Aperis pluraj proponoj pri temo: membrovarbado, artefaritaj lingvoj, ĝenerale *io* kio ne nepre rilatas al Esperanto sed io povas esti amuza aŭ interesa por ĉiuj kaj ne nur por la jamaj aktivuloj. Ni povas demandi ankaŭ niajn membrojn proponi temon.

6. Datoj por estraraj interkonsiliĝoj en 2014

Por la printempo: 23.1., 6.3., 10.4., 22.5. kaj 26.6.

7. Eventualajoj

- a) Proceduro je aliĝoj: Douglas Draper mesaĝis, ke li volonte asistas pri dissendado de informo al novaj membroj. Li ankaŭ asistis Mario Machlik pri bonveniga letero al novaj membroj, kaj la estraro aprobas la leteron.
- b) Ni ŝanĝos la membronombrojn en la Jarlibro de UEA. La nombro estis 182, la nova nombro estos 152. La kasisto mesaĝos al UEA.
- c) Herman Ranes baldaŭ estos en Oslo, kaj kaptos la okazon labori pri la komputilo en Esperantonia.
- d) Nia retservilo Ludde (ludde.esperanto.no) hieraŭ tute forŝaltiĝis. La retpaĝoj translokiĝis al servilo ĉe Initio Medielab jam en februaro, kaj antaŭ tri tagoj translokiĝis ankaŭ la retpoŝta sistemo, inkluzive de la retpoŝtaj listoj.
- e) Ni provas trovi estraranon kiu havas kapaciton verki ĉefartikolon por *Norvega Esperantisto* 6/2013.

La interkonsiliĝo daŭris 19:49–21:47.

Protokolis Jardar Eggesbø Abrahamsen.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 23an de januaro 2014.

Jardar Eggesbø Abrahamsen (sign.)
referent

Ulf Chr. Lunde (sign.)
stadfester protokollen